




Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2010 numero 1-a: januaro-februaro

dissendo je la 4-a de februaro



Lee Jung Kee kun Mirejo en la Esperanto-Centro de Seulo (Koreio)

Lee Jung Kee estas tre aktiva esperantisto en Sud-Koreio. Li instruas en sia "nesto": la Esperanto-Centro de Seulo ĉe la sesa etaĝo de domo en la centro de tiu urbego kaj en diversaj universitatoj. Aŭtoro de lernolibro de esperanto por koreoj, li nun prezidas la Komisionon pri Azia Esperanto Movado (KAEM) de UEA. Talenta, agema, energia motoro de la azia esperanto-movado, kiel ĉiuj koreoj li havas kromnomon en esperanto: Ŝlosilo. En 2008 li organizis la vojaĝon de Mireille Grosjean tra Koreio de la 15-a de septembro ĝis la 10-a de oktobro. En la okdekaj jaroj li vizitis La Chaux-de-Fonds.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio :

Claude Gacond, Str. Chevreuils
14, CH-2300 La Chaux-de-Fonds

Retpoŝto : gacond@bluewin.ch

Tel. : hejme: 032 926 52 32

ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:

Nancy Fontannaz, Stefano Keller,
Richard Schneller

SES informas

Redaktaj datlimoj

2010-2 : aprilo-junio :

marte 10, dissendo 1-an de aprilo.

2010 3 : julio-oktobro :

julie 1, dissendo 15-an de aŭgusto.

2010-4 : novembro-decembro :

oktobre 10, dissendo 1-an de novembro.

2011-1 : januaro-marto :

januare 10, dissendo 1-an de februaro.

Konsultu la retejon de SES !

www.svisa-esperanto-societo.ch

SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto, Grand-Rue
9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18 88 kaj
079 69 709 66.

Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, Archstr.
2, 8610 Uster. Tel.: 044 251 50 25. Retpoŝto :
info@esperanto.ch

Stefano Keller, sekretario, CP 6034, 1002
Lausanne. Tel.: 076 261 06 09. Retpoŝto:
kellerstefano@gmail.com

Hans-Werner Grossmann, kasisto, Esperanto-
Servo, PF 262, 4132 Muttenz 1. Tel.: 076 460
89 92. Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Nelida Weidmann González, respondeca por
familiaj renkontiĝoj kaj aktivecoj. Archstr. 2,
8610 Uster. Tel. : 044 251 50 25.

Poŝta ĉekokonto :

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds

Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

Vivo de SES

2010-1, redaktis: Stefano Keller

**Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo
sabate, la 17an de aprilo 2010**



*Wil, Restoracio Freihof, Bronschhoferstr. 2
(Kantono Sankt-Gallen, inter Winterthur kaj Sankt-Gallen)
www.hotelfreihof.ch
5 minutojn piede de la stacidomo laŭ Obere Bahnhofstrasse*

Invito al la Jarkunveno 2010 en Wil

Horaro:

10h00 Malfermo, akcepto
11h00 Ĝenerala Kunveno
12h30 proks. fino de la Ĝenerala Kunveno
13h00 Manĝo (surloke)
14h30 Prelego de Mirejo Grosjean pri « UN, UNESCO, UEA »
15h30 proks. fino de la prelego
17h00 proks. fino de la tago

Aliĝo

Pro organizaj kialoj necesas anonci sian partoprenon ĝis komence de aprilo
- per la aldonita aliĝilo sendenda al: *Mirejo Grosjean, pf 9, 2416 Les Brenets*
- aŭ retmesaĝe: *mirejo.mireille@gmail.com*
- aŭ per la aliĝilo reta: *www.svisa-esperanto-societo.ch/jarkunveno*

Tagordo de la Ĝenerala Kunveno de SES

1. Salutado, konstato de la nombro de ĉeestantoj, informoj pri senkulpiĝoj
2. Aprobo de la tagordo
3. Elekto de voĉnombrantoj
4. Evoluo de la membraro
5. Akcepto de la protokolo de la Ĝenerala Kunveno 2009 (*SESi 2009-3*)
6. Vivo de la societo: akcepto de la estrarraporto (*ĉi-sekva artikolo*)
7. Financoj. Prezento kaj akcepto (*aperos en SESi 2010-2*)
8. Konsisto de la Komitato. Elekto de komitatano
9. Elekto de kaskontrolantoj
10. Projektoj por 2010
11. JES (junuloj), SIS (Svisa ILEI-Sekcio), SFERO (familia renkontiĝo), SAT, SAT-Amikaro, Pasporta Servo k.s.
12. Buĝeto 2010 (*aperos en SESi 2010-2*)
13. Diversaĵoj

Proponoj

Proponoj pri tagordaj punktoj por la Ĝenerala Kunveno devas alveni al la retadreso de la Estraro: ses@esperanto.ch aŭ rekte al unu el la prezidantoj, antaŭ la 17a de februaro 2010. Proponoj devas esti subtenataj minimume de tri membroj de SES.



Svisa Esperanto-Societo *Jarraporto pri la jaro 2009*

Membraro

SES nombras 149 membrojn je la fino de la jaro 2009. Malaperis 16 membroj pro malaliĝo aŭ ĉeso de pago de la membrototizo. Mortis S-ino Fregonara en Genevo. Aliĝis 17 novaj membroj dum 2009, ni bonvenigas ilin.

Aktivecoj

La 16an de majo 2009 okazis ĝenerala kunveno de SES en La Chaux-de-Fonds. En tiu kunveno reaperis kun-prezidanto Mirejo Grosjean post okmonata mondvojaĝo.

Sub la aŭspicio de Svisa Esperanto Societo SES kaj de SIS Svisa ILEI Sekcio, studsabatoj okazadas en CDELI (www.cdeli.org) ĉiun trian sabaton de la monato. Ili estas la plej bonaj okazoj por lerni la lingvon kaj/aŭ progresi. Fidele

kunvenas proksimume deko da gesamideanoj. Instruas tie ĉefe Monika Molnar, Luko Allemmand kaj Nancy Fontannaz. SES-estraro varme dankas ilin.

Same okazadis la kulturaj seminarioj en CDELI en La Chaux-de-Fonds. Prelegas Claude Gacond kaj aliaj. Vi konstatas, ke tiuj kunvenoj okazas ĉiam la unuan sabaton de la monato. SES estraro elkore dankas al Claude Gacond pro lia elstara kaj valorega laboro en CDELI.

En CDELI ankaŭ eblas aĉeti librojn, lernolibrojn, vortarojn, k.s.

En la jaro 2009 nia ĉefa aktiveco estis la konkurso.

La rezulto estis ne tre bona, pro multaj aspektoj, pri kiuj vi povas legi en alia artikolo de tiu ĉi numero.

La sepan de novembro estis festa kunveno en La Chaux-de-Fonds por digne memori pri la 150jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof.

Mocio en la parlamento de la kantono Neuchâtel

Kolego de Claude Gacond, Sinjoro Alain Bringolf ekverkis mocion por la kantona parlamento neŭŝatela pri esperanto: «Valoriser l'espéranto». La voĉdono pri la mocio okazis la 18an de februaro 2009: aprobo. La 10an de decembro 2009 okazis kunveno en la registaro de la kantono pri la sekvoj de tiu mocio; partoprenis Mirejo Grosjean, Alain Bringolf kaj Sinjoro Christe, vicĝenerala sekretario de la Departamento pri Edukado.

Informado

Mirejo Grosjean daŭrigas sian laboron ene de Romandio. Ŝi nuntempe « nutras » 160 personojn / instancojn. Laŭbezone ŝi sendas rapide gazetaran komunikon per la Reto. Paralele Dietrich Weidmann agadas en Alemanio. Novaj kontaktoj naskiĝis en Tiĉino.

Organo, informilo

Nia organo « SESinformas » aperis kvarfoje dum la jaro kun valoraj informoj ne nur pri la vivo de la societo, sed ankaŭ kun kultura enhavo. Ni elkore dankas al la redaktoroj Claude Gacond, Richard Schneller kaj Stefano Keller.

Lokaj kaj fakaj grupoj

Lokaj kaj fakaj grupoj aktive kunvenadas kaj havas sian propran vivon ie kaj tie en Svislando. Por scii pri tio, kaze ke vi vojaĝadas en nia landeto, vidu nian organon « SESinformas ». La estraro de SES estas tre feliĉa pri tiu bunta agado tra Svislando. SES subtenas finance iun tutnacian kunvenon kiel ekzemple SFERO. Tamen la estraro opinias, ke ĝi ne devas enmiksiĝi en tiaj tre valoraj aktivecoj. Resume: morale subteni: jes, finance subteni: jes, diktatori: ne.

Junularo

La kutima nomo por la junularo estas JES. Laŭ nia scio ne estas nun vigla aktiveco, tamen estas kelkaj agemaj individuoj. Estas eĉ grandaj planoj en preparo.

Universala Esperanto Asocio (UEA)

SES estas landa sekcio de UEA. La ligoj estas tre regulaj. Mireille Grosjean reprezentas SES-n ene de la komitato de UEA.

Unuiĝintaj Nacioj (UN) en Ĝenevo

Pro la ĉeesto de UN en Ĝenevo, UEA bezonas surlokajn homojn por zorgi pri kontaktoj inter tiuj du instancoj, ĉar UEA estas Ne-Registara Organizo (NRO) agnoskita de UN. Nome de UEA deĵoras ĉefdelegito Stefano Keller kaj kvar aliaj personoj: Nicole Margot, Mirejo Grosjean, Cesco Reale kaj Charmian Common. Tiu deĵorado signifas ne nur partoprenon, sed ankaŭ preparon, interalie legadon de la retejo, dokumentoj de UN, pluan flegadon de akiritaj kontaktoj. Laŭokaze tio signifas plie verkadon de interveno.

Internacia Ekzamena Komisiono de ILEI / UEA

Prezidanto de ĝi estas Mirejo Grosjean. Vicprezidanto de ĝi estas Monika Molnár. Kvin aliaj membroj loĝas en aliaj kontinentoj.

Mireille Grosjean, Dietrich Weidmann



Donacoj ricevitaj dum oktobro - decembro 2009

S-ro David Buhmann, Prilly (60) - S-ro Didier Cornuet, Genève (10) - S-ro Noël Huguenin, La Chaux-de-Fonds (40) - S-ino Marguerite Jayet (mortis la 11an de februaro 2008), heredaĵo (2000) - S-ino Heidi Keller-Bissegger, Bern (20) - S-ro Jean-Jacques Lavanchy, La Tour-de-Peilz (30) - S-ino Piroška Morocz, Zürich (5) - S-ino Claire Nicolet, Commugny (10) - Parzival, Bienne (50) - S-ino Barbara Pochanke, Wil (20) - S-ino Ruth van Puijenbroek, Winterthur (25)

Entute: CHF 2'270.- Grandan dankon al la malavaraj subtenantoj de SES!

Nova patrono de SES, 2009

S-ino Yvette Goy, Cully.

Konkurso SES 2009

Analizo de eblaj kaŭzoj de malgranda sukceso

Bv vidi rete:

[www.svisa-esperanto-societo.ch/concours aŭ /wettbewerb aŭ /konkurso](http://www.svisa-esperanto-societo.ch/concours_aŭ/wettbewerb_aŭ/konkurso)

www.esperanto-konkurso.ch

Esperanto-Konkurso 2009
organizita de la

Svisa Esperanto-Societo!

Por via subteno:

poŝta ĉekokonto 17-581908-4,
Svisa Esperanto-Societo,
2300 La Chaux-de-Fonds

anonco de la konkurso | konkurso | studo, ligoj

**Gajnu feriojn en
Esperantolando!**

Ĉu vi ŝatus renkonti personojn el aliaj landoj kaj kulturoj, facile rilati kun ili sen lingvaj obstakloj, vojaĝi tra la mondo sen problemoj komunikaj kaj gastoj senpage ĉe enloĝantoj? Ĉu vi deziras amuziĝi, danci, festi je la alia flanko de la mondo babilante kun novaj lokaj geamikoj?

En 2008 la Esperanto-grupo La Stelo en Ĝenevo organizis konkurson. Ili ricevis mondonacon por varbi pri Eo kaj imagis, ke konkurso estus bona strategio. Tiu konkurso rilatis al Romandio.

Venis proponoj kaj promesoj de monhelpo al SES, por ke SES organizu tutsvisan tian konkurson. La estraro de SES faris la laboron.

Unue: faktoj

Aperis anonco en « 20 Minutes » en tuta Svislando, unufoje, komence de junio 2009. Ni presigis 10'000 flugfoliojn. Pluraj homoj disdonis flugfoliojn en bazaroj dum horoj. Tio okazis nur en Lausanne, Bazelo, Zuriko, La Chaux-de-Fonds (sabata merkato, disdono en la Universitato de Neuchâtel).

Ni aperigis retajn informojn (krom la konkursa retejo) - Pluraj informoj pri la konkurso aperis en blogoj. - Ni plurfoje informis sur la retlisto « Svislando ». Okazis du radioelsendoj pri la konkurso (Cesco Reale en Vaŭdo-Valezo, Didi Weidmann en Zuriko). - Okazis televidelsendo de Canal Alpha (Neuchâtel) kun Mirejo Grosjean (www.youtube.com/EsperantoTv).

Aliĝi eblis ĝis la 30a de junio. Ni prokrastis tion al la 20a de julio. La gazeta anonco, la teksto sur la flugfolioj kaj aliaj informmanieroj indikis la adreson de la retejo por plua paŝo.

Aliĝis 12 personoj entute. 8 personoj ne liveris sian tekston ĝustatempe. Mirejo telefonis al ili por informiĝi. Iu perdis familianon, iuj malsaniĝis, iuj havis tro da aliaj taskoj, ...

4 lernantoj de la lernejo « La Grande Ourse » en La Chaux-de-Fonds entuziasme studis dum monatoj pro la konkurso kaj altigis sian nivelon; ili sendis ĝustatempe sian tekston. Ili partoprenis en la fina ekzameno en Lenk la 17an de oktobro.

Tri el ili gajnis:

Unua premio: Ailen Bilat. (ina, 1995)

Dua premio: Sacha Bilat (vira, 1998)

Tria premio: Sami Bapté (vira 1994)

Partoprenis kaj gajnis libron: Félix Cortès (vira, 1997)



Félix, Ailen, Sacha kaj Sami kun Monika en Lenk, la 17-an de oktobro 2009
(foto: Stefano Keller)

Kompare kun la ĝeneva konkurso, oni povas paroli, proporcie, pri granda sukceso:

- en Ĝenevo aliĝis 150 personoj. 100 rajtis partopreni la konkurson. 16 venis al la fina ekzameno.
- en 2009 aliĝis 12 kaj venis al la fina ekzameno 4, do triono !

Se la celo de la konkurso estas enmovadigi novajn personojn, ni vidos post kelkaj jaroj, ĉu tia rezulto okazis.

Due: Taskoj

- Koncepti la konkurson, datlimojn, lokon de la ekzamenoj, regularon, premiojn, ktp (teame)
- Koncepti la retejon (teame)
- Fari la retejon.
- Decidi pri anoncoj (teksto, en kiuj gazetoj, radioj, TV) (teame)
- Mastrumi la aliĝojn, kontakti kun la aliĝintoj.
- Verki la ekzamenojn
- Legi la tekstojn de la kandidatoj (teame)
- Loka Ekzamena Komisiono LEK (3 personoj)
- Prepari la premiojn
- Prepari la diplomojn

Sponsorado

Individuoj kaj instancoj monhelpis por la konkurso.

Kostoj

Anonco en « 20 minutes »: CHF 4'290.25

Presado de flugfolioj: CHF 379.-

Premioj: CHF 800.-

Premioj libraj: CHF 90.-

Premioj T-ĉemizoj: CHF 40.-

Premioj 4 manĝoj en SFERO: CHF 60.-

Premioj vojaĝkostoj La Chaux-de-Fonds - Saarbrücken (NR), 3 infanoj kaj akompananto: CHF 607.-;

Restado en SFERO de la tri membroj de Loka Ekzamena Komisiono (LEK): CHF 420.-,

Vojaĝkostoj de la LEK-membroj al Lenk: CHF 86.-,

Kotizoj NR (restado tie de la tri gajnintoj kun akompananto plenkreskula): CHF 1'339.10

La suma kosto estas CHF 8'111.35

Volontula laboro kaj kostoj, kiuj ne aperas en la supra priskribo

Preparo de la retejo, prezo de la retejadresoj

Kreado, disdono de flugfolioj

Verkado de la ekzamenoj

Trapasigo de la ekzamenoj

Korekto de la ekzamenoj

Koncepto

La pripensado pri kelkaj aspektoj de la konkurso ne estis profunde farita, ni ne dediĉis sufiĉe da tempo por tio. Sponsoro kaj laŭzananaj pretis kunlabori, tamen tio ne eblis.

Sekvas kolekto de rimarkoj de pluraj personoj pri tiu konkurso

- Varbado

En la GE-konkurso (Esperanto grupo la Stelo en Ĝenevo) la sumo por la konkurso estis trifoje pli alta ol por la SES-konkurso. (Suma buĝeto de la ĝeneva konkurso estis CHF 25'000) La prizorgantoj de la GE-konkurso povis meti anoncojn en pluraj malsamaj ĵurnaloj.

SES aperigis anoncon en unu ĉiutaga senpaga ĵurnalo (20 Minutes). Temis pri malgranda anonco, kiu aperis unufoje. La teksto de la anonco devus enteni pli da informoj; oni ne povas simple gvidi homojn al retejo. Uzi « TU » en la franca lingvo malplaĉis al kelkaj homoj. Se la tempo por aliĝado estus pli longa, oni povus post unua anonco, kaze de bezono, re-anonci la konkurson duan fojon.

- Flugfolioj, informiloj

Oni diris, ke la koloroj de tiu dokumento ne estis allogaj.

- Momento

Ni anoncis la konkurson tro malfrue. Tempodaŭro inter la anonco kaj la datlimo por aliĝo estis tro mallonga. La unua aliĝolimo estis la 30a de junio, poste oni prokrastis tion al la 20a de julio. Liverado de verkaĵo devis okazi la unuan de oktobro. Prokrasto ne estas bona solvo.

Ĉu studi aŭ ne studi somere ?? En la GE-konkurso la 3 monatoj estis dum la vintro. En la SES-konkurso, kelkaj personoj diris, ke ili ne deziras studi dum la somero.

- Premioj

Eble ili estis ne allogaj. En la GE-konkurso estis mono. Eble mono altiris pli ol feriado en EsperantoLando... Kaj por multaj: feriado en EsperantoLando diras nenion... Libro, enciklopedio: ne alloga.

- Kunlaboroj kun lokaj grupoj

Ili ne funkciis laŭ nia atendo. Ni ne komprenas kial.

Nome de SES-estraro: Mirejo Grosjean, 2009-12-30



Tutsvisa aktiveco

Koncerta recitalo de Elisabeth de Mestral


La Kultura Festo de la 7-a de novembro, organizita honore al L. L. Zamenhof naskiĝinta antaŭ 150 jaroj, malfermiĝis matene per koncerta recitalo de Elisabeth de Mestral kun la pianisto Wolfram Fischer. Ĝi vigle impresis per sia alta kvalito. Tiu muzikista duopo entuziasmigis la aŭskultantojn per la kanta kaj elparola matureco de la solistino kaj per la akompana virtuozezo de ŝia kunlaboranto. Oni ĝoje malkovris, ke en la svisa esperanto-movado ekzistas artistoj reale lertaj. Ankaŭ la talento de Dominique de Mestral impresis per la adekvateco de liaj kantotradukoj, kiujn la aŭskultantoj povis kompari al la franclingvaj originalaj poemoj per broŝuro entenanta ĉiujn kantotekstojn.



Elisabeth de Mestral



La aŭskultantoj tenantaj la broŝuron kun la kantotekstoj. Unuarange el la maldekstro je la kvara loko la poemtradukinto Dominique de Mestral.



Wolfram Fischer plane enkondukanta novan kanton.



Elisabeth de Mestral ridas kun la publiko konklude al humura kanto.

La emo esperantigi nacilingvajn artaĵojn estas certe kultura karakterizaĵo, kiun ni ŝuldas al Zamenhof mem. En 1887 enkonduke al sia broŝuro *Lingvo Internacia* la Doktoro Esperanto argumentis tiel: « *Ĉe ekzistado de lingvo internacia ĉiuj tradukoj estus faritaj nur en tiun ĉi lastan, kiel neŭtralan, al ĉiuj kompreneblan, kaj la verkoj, kiuj havas karakteron internacian, estus eble skribataj rekte en ĝi.* » Kaj jam 7 jaroj poste en 1894 Zamenhof mem publikigis sian famiĝintan tradukon de la tragedio *Hamlet* de W. Shakespeare. Aŭdigi poemojn de francaj verkistoj muzikigitaj de francoj en esperanta versio estis do inda maniero fideli al la zamenhofa traduka programo lanĉita en 1887.

Claude Gacond

Prelego de Sébastien Moret pri Ruslando kaj Zamenhof.

Posttagmeze Sébastien Moret prezentis al ni, en kiu Ruslando vivis Zamenhof. Kun dankemo lian prelegan tekston kun la bildoj, kiujn li vidigis, ni publikigas en la kulturaj paĝoj de tiu ĉi bulteno.

Sébastien Moret estas kunlaboranto en la Sekcio pri Slavaj lingvoj ĉe la Universitato de Laŭzano, kie troviĝas rondo de esploristoj pri la prilingva historio en Centra kaj Orienta Eŭropo. Kadre de tiu fako li interalie efektivas esplorojn pri interlingvistiko kaj pri la temo esperanto en Sovetio kaj pri la historio kaj epistemologio de la artefaritaj lingvoj ĝenerale. Tial li estas regula vizitanto de CDELI.

Lia prelego konsistis el tri eroj : Unue : Ruslando je la zamenhofs epoko. Due : Esperanto en la cara Ruslando. Kaj trie : Esperanto en Sovetio.

Liaj diroj konsciigis nin pri multaj faktoj kulturaj kaj politikaj, kiuj historie malsimiligis Ruslandon el la resto de Eŭropo jam ekde multaj jarcentoj. Ĝi ankaŭ instigis nin rekonsideri la vivon mem de L. L. Zamenhof laŭ novaj vidpunktoj. Neimageble estas por okcidenteŭropano en kiaj malfacilaj vivcirkonstancoj troviĝis la iniciatinto de la *Lingvo internacia* kaj de la *Homaranismo*.



Sébastien Moret, antaŭ la mikrofono, konklude al sia prelego respondas franclingve al demandoj de la publiko. Stare Claude Gacond gvidas la diskuton kaj Marie-Louise Münger lerte esperantigas la respondojn de la preleganto.

Premiado de 3 partoprenintoj al la Kultura Seminario

Je la lanĉo de la Studa Seminario disvolviĝanta ĝenerale la unuan monatsabaton ĉe CDELI sub la gvido de **Claude Gacond**, estis anoncite, ke partoprenantoj al 15 studsabatoj ricevos studatestilon.

Ĉar el la dudeko da partoprenantoj de tiu Seminario jam tri el ili ĉeestis entute 15 sabatajn renkontojn, tial povis esti anoncita unua disdono de stud-atestilo. Kun aldona donaco de la Libro-Servo de CDELI tiel estis festitaj : Arlette Di Vetta de Ĝenevo, Nancy Fontannaz de Pully kaj Andrée Gacond de La Chaux-de-Fonds.

Malferme al tiu premio Arlette Di Vetta esprimis siajn dankojn pri la organizo de tiu Seminario per la ĉi sekvaj vortoj :

Mi volas diri kelkajn vortojn pri tiu aranĝo „Kultura Seminario“ : Dum pluraj (15) sabatoj, mi trajnis de Ĝenevo al La Chaux-de-Fonds por plibonigi miajn konojn pri la Esperanta kulturo. Kiomope ni estis en tiuj kunvenoj ? Tio ne estas grava : grava estas nur tio, kion mi elkovris.

Ekzemple, ni studis la disvastiĝon de la diversaj internaciaj lingvoj kaj kial ili fiaskis. Iliajn avantaĝojn aŭ similaĵojn. Claude Gacond preparis manskribitan skemon montrantan la grandajn etapojn de tiuj lingvo-ideoj : Kiam kaj pro kio homoj kiel Haupenthal spertis aliajn sistemojn. Estas interese koni tiun evoluon. Bedaŭrinde, ni devas konstati preskaŭ ĉie disputojn inter homoj, kiuj volis troviĝi mem en la estonteco, sen vere pensi pri la estonteco de la lingvo mem...

Ni parolis pri La Nica Literatura Revuo, ni legis artikolojn eltiritajn de ĝi. Ni rememorigis pri kelkaj diversaj ĵurnaloj, kiuj aperis kaj rapide malaperis : pro manko da mono, pro la mondmilito kaj pro ambicio de personoj, kiel mi diris.

Ni legis malnovajn tekstojn kaj revidis la manieron kiel, dum la unua tempo de la lingvo Esperanto, oni verkis, kun paraleloj al aliaj internaciaj proponoj de lingvoj. Ni ankaŭ analizis tekstojn de diversaj aŭtoroj : Georges Lagrange, Marjorie Boulton, Claude Piron, ktp, kaj ni tiel vidis kaj rimarkis la diversajn skribmanierojn kaj la stilojn.

Mi faris ĉi-supre malgrandan panoramon de la enhavo de niaj kunvenoj. Mi esperas, ke la esperantistoj povos havi ĉie okazojn lerni por scii, kiel ni evoluis kaj kiom da fortoj ni bezonis por atingi nun valoran Esperantan literaturon...

Ne forgesu, ke lingvo estas ne nur komunika rimedo, sed ankaŭ pensmaniero, maniero por travivi sian korinklinon, legmaniero pere de kiu kulturo formiĝas.

Tutsimple, lingvo estas maniero vidi la mondon.

Mi antaŭdankas la personojn, kiuj volas fari similan laboron : interesi la esperantistojn pri la evoluo, la vivo kaj la literaturo de Esperanto. Pensu pri la novuloj en la movado ! Ili volas multon, kaj rapide. Certe ili trovos ĉion pere de Interreto, sed tamen iu gvidado povas helpi ilin.

Mi dankas al CDELI, kiu organizis tian kurson. Kaj mi finas pruntante titolon de Claude Piron, Ĉu ni kunvenis vane ? Mi insistas, ke ni NE kunvenis vane.

Arlette Di Vetta

CDELI

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia

Bibliothèque de la Ville, Progrès 33
CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds
Tel. : 032 967 68 42.

claude.gacond@ne.ch,
martine.schneller@ne.ch,
nancy.fontannaz@ne.ch

Grava donaco

Ne nur Mireille Grosjean mone kontribuis al la kompletigo de la CDELI-kolekto de la prizamenhofaj verkoj de Ludovikito, kiel ni menciis en la pasinta bulteno. Ankaŭ la eldonisto sinjorino Keiko Syozi en Tokyo malavare kontribuis al la agado per duonigo de la vendoprezo de tiuj gravaj libroj, kiujn nun en CDELI Martine Schneller katalogas.

CDELI esprimas grandan dankon do al ambaŭ: Mireille Grosjean kaj Keiko Syozi.

Venontaj stud-aranĝoj !

Didaktika stud-sabato okazas principe la trian sabaton de la monato en neferia periodo helpe al ĉiuj esperanto-lernantoj : tutkomencantoj, komencantoj kaj progresantoj. Instruas Monika Molnar, Nancy Fontannaz kaj Luc Allemand. Rezervu la sekvajn sabatojn : **februare 20, marte 20, aprile 24, majo 29, junio 19, septembre 25, oktobre 23, novembre 20, decembre 18.**

La Kultura Seminario reokazos principe la unuan sabaton de la

monato ekde septembro. Studemuloj do rezervu la sekvajn sabatojn: **septembre 4, oktobre 2, novembre 6 kaj decembre 4.** La studtemon ni ni anoncos en la venonta bulteno.

-oOo-

KCE

Kultura Centro Esperantista
Esperanto-Domo, Strato Postiers 27,
Poŝtfako 311
2301 La Chaux-de-Fonds.
Tel. & fakso: 032 926 74 07.
esperantio.net

Programo

Februare 27-28: Asembleo de la Kooperativo de Literatura Foiro kaj Seminario pri amaskomunikilaj rilatoj, sub la gvido de Louis Wunsch-Rolshoven el Berlino, kiu estas fakulo pri informado kaj komunikado. Lia kompetento fontas el multjara sperto en gazetara servo pri esperanto, laste kiel respondeca pri la asocio Esperanto-Land.

Loĝiga servo ĉe KCE

KCE garantias loĝigan servon por siaj gastoj. Entute la Esperanto-Domo disponigas 15 litojn, en unu-kaj-du-litaj ĉambroj (unu estas kvarlita, kun balkono, kaj taŭga por familio kun infanoj). Eblas mendi matenmanĝojn en la komuna kantino.

Unu el la dultitaj ĉambroj situas en apartamento, kun ekipita kuirejo kaj propraj higienaj servoj. La apartamento povas inkluzivi apudan ĉambon, por entute tri personoj.

ŝanĝoj. La registara reago ne ĉesis je la morto de Aleksandro. Kontraŭe, liaj posteuloj, per pli da viglo, streĉos al ordo-reveno kaj al respektemo de la du caraj agvortoj : aŭtokratio kaj ortodoksismo. Je la morto de Aleksandro la 2-a estas lia dua filo, kiu sidiĝis sur la tronon de ĉiuj Rusujoj sub la nomo Aleksandro la 3-a.



Aleksandro la 3-a

Por venĝi la morton de sia patro, Aleksandro la 3-a kondutos senkompate. Li promulgos portempajn reglamentojn, kiuj nur laŭnome estis portempaj, ĉar nur dank' al la revolucio de 1917 ili malaperis. Per tiuj reglamentoj ĉio estis efektiviĝebla, kiam temis pri la sekureco de la ŝtato. La caro lerte regadis per domtraserĉoj, arestoj, militecaj procesoj, deportadoj kaj ekzekutoj. Tial la terorismo estis neniigita dum multaj jaroj. Plie Aleksandro la 3-a entreprenis kontraŭreformojn kun la celo limigi la disvolviĝon de la ŝanĝoj entreprenitaj de lia patro. Li agadis por favori la nobelaron kaj por kvazaŭ rezervuti la rusajn kamparanojn. La ortodoksismo estis perforte trudita kaj la religia toleremo praktike malaperis.

Aldoniĝis al tio strikta kontrolo de la gazetaro kaj cenzuro ekstreme truda kaj efika. Je la morto de Aleksandro la 3-a en 1894 estas lia filo Nikolao la 2-a, kiu ricevis la povon. Li estos, kiel vi scias, la lasta caro de la Rusa Imperio.

Sub lia regado reakcio plu daŭris : religiaj persekutoj, rusiga politiko, limigo de la individuaj kaj gazetaraj liberecoj. Oni povas iel diri, ke ambaŭ lastaj rusaj suverenoj ne vivis sur la sama planedo, ol iliaj regatoj. Blindigitaj pro sia volo garantii la estontecon de aŭtokratio, ili ne perceptis la katastrofan viv-situacion de la rusoj. Ilian vidon de la realo falsigis la silentema kaj senmova mondo, en kiu ili vivis. Tio, tutcerte aldonita al la karaktero etmensa kaj malvigla de Nikolao la 2-a, favoris la revoluciajn eventojn unue de 1905, kaj poste de 1917, kiuj kondukis al la malapero de la Rusa Imperio kaj al ĝia anstataŭigo per la proletara diktaturo.



Nikolao la 2-a

Post tiu iom detala priskribo de la historia situacio de Rusujo je la zamenhafa epoko, mi proponas iom detale interesiĝi al Esperanto kaj al ties historio en la rusuja etoso ĵus priskribita. Ni vidos, ke certamaniere la rusuja kaj sovetia historio speguliĝas en la Esperanta historio.

Sed eble en lia nova domo ekde marto en Zollikofen, proksime de busoj kaj tramoj bernaj.

Esperantistoj de la berna regiono nepre kontaktu kaj kuraĝigu lin. Jen la kontaktebloj :

S-ro Ueli Haenni, Linckweg 2, Postfach, CH-3052 Zollikofen.

Telefona : 031 911 64 72 (kun respondilo) aŭ oficeje 031 911 23 22.

ueli.haenni@swissonline.ch

-oOo-

Les Brenets



Fotis Mireille Grosjean

La preĝejo de Les Brenets

Koncerto de la infana koruso

La 22an de novembro je la 17a horo okazis koncerto de la infana koruso de mia vilaĝo Les Brenets. Kantis 17 infanoj kaj junuloj. La temo estis "*preĝi tra la tuta mondo*". Estis malgranda orkestro, kie ludis mia filino Marion Bélisle, violonĉelistino, kaj mia nepo Romain per diversaj frapinstrumentoj. Dum la kantoj la publiko povis admiri fotojn pri la koncerna lando sur granda ekrano. En la programo estis mencio, ke danke al Esperanto la organiz-

antoj povis akiri kantojn el la tuta mondo. La estrino respondeca de la koruso nun lernas esperanton. La preĝejo estis plena, venis la gepatroj, geonkloj, geamikoj, geavoj, ktp.

Danke al kunlaboro inter Tajima Majuko kaj Marion Bélisle la koruso povis kanti la kanton "*sonorilo de paco*", kiun mi aŭdis en Wakayama en oktobro 2008 dum japana kongreso. La infanoj kantis en la japana, en la franca kaj en esperanto. Pri Japanio estis fotoj de sakura kaj fotoj de ŝintoisma sonorilo sub tegmento.

Estis granda sukceso.

Mi tre dankas al Tajima Majuko pro ŝia helpo por tiu koncerto. Mi povis rekte gratuli kaj danki al la muzikistoj. Estis granda ĝojo kaj emocio por mi aŭdi tiun kanton denove.

Mireille Grosjean

-oOo-


La Chaux-de-Fonds

Esperanto en bibliotekojn

Tiu esprimo *Esperanto en bibliotekojn* estas en la programo de UEA. Regule nia tegmenta organizo sendas stokon da libroj al bibliotekoj en la tuta mondo.

La familio Bélisle kaj mi iom studis la aferon por fari saman agadon, tamen pli modestan, en nia regiono. Unue ni konsultis la retejon RERO por kontroli, kiuj libroj jam ekzistas en kiuj bibliotekoj. Ni trovis tute kontentigan situacion en Romandio. Poste venis la ideo, ke ni

donacu du librojn al la du bibliotekoj por gejunuloj en La Chaux-de-Fonds kaj al la biblioteko por gejunuloj en Le Locle. Ni elektis la sekvajn librojn, en la franca lingvo : verko de Sylvan Zaft « *Le langage secret de Peter Jameson* », en esperanto : « *Mil unuaj vortoj en esperanto* »



Fotis Mireille Grosjean

Samuel kaj Romain kaj bibliotekistinoj

La 23-an de decembro miaj du nepoj Romain kaj Samuel kaj mi ludis Avo-Froston kaj iris liveri tiujn donacojn.

Mireille Grosjean

Mortis John Thum

Mortis John Thum je la aĝo de 85 jaroj la 28-an de novembro. En esperanto-kurso, kiun mi gvidis en La Chaux-de-Fonds meze de la sesdekaj jaroj, li eklernis nian lingvon kun sia edzino Jeannette, kaj tuj ambaŭ aktive partoprenis la lokan esperanto-vivon kaj la skiferiojn en Adelboden same kiel aliajn renkontojn.

Ilia unua ĉeesto en esperanto-semajnfino estis skie sur la monto Chasseron. La dimanĉon matene, kiam mi alvokis la dormantojn por admiri la sunleviĝon, John kaj

Jeannette tuj venis al la fenestro. Sed fakte nur la sekvan jaron, kiam reaŭdiĝis mia alvoko, tiam John ŝerce diris: « *Ho, nur nun mi komprenas, kion mi estus devinta admiri pasintjare !* »



Fotis Claude Gacond

En 1968 John kaj Jeannette Thum dum la esperanta skiferio en Adelboden.

Ili loĝis borde de la lago de Les Brenets, kaj kiam la rivero Doubs glaciĝis, tiam ili invitis nin al sketa renkonto sur la frostinta lago. Foje Jeannette falis sur la genuojn kaj pene releviĝis. Tuj grupo da sketantoj ĉirkaŭis ŝin, kaj kiam ili aŭdis ŝin ekplendi esperantlingve pri siaj doloroj, ili konstatis : « *Devas esti grave, ĉar ŝi parolas latine !* »

John Thum alportis al mi vigan helpon, kiam mi ekstarigis la sekretariejon de KCE ĉe la strato Postiers 27 en La Chaux-de-Fonds. Kiel dom-farbisto ne nur liaj konsiloj estis gravaj, sed ankaŭ lia regula helplaboro.

Post la morto de Jeannette, John Thum baldaŭ reedziĝis, kaj kun sia nova edzino Jeanne-Marie Müller kaj ŝia filino Geneviève kaj ties du filinoj li loĝis en domo apuda al tiu Mireille Grosjean. Do kiam fine de la okdekaj jaroj li eksciis, ke Mireille lernas esperanton, tiam li forte

kuraĝigis ŝin ne resti pasiva kaj atentigis ŝin pri esperanta raraĵo propra al Les Brenets : la esperantostelo pentrita de Edouard Ducommun sur la vojo al la akvofalo Saut-du-Doubs, kiun li estis reŝarĝinta por ke ĝi restu bone videbla de la promenantoj. Unu el la du filinoj de Geneviève estis lernantino de Mireille en Le Locle. Ŝi venis plurfoje helpi sian instruistinnajbarinon por la enkovertigo de dosieroj pri esperanto regule sendataj al la romanda gazetaro ekde 2002.

Claude Gacond

-oOo-

Genève

Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 734, 1212 Grand-Lancy 1

Tel. : 022 771 24 37

La kunvenoj okazas en Maison des Associations, rue des Savoises 15.

Pri la ŝildo pri Zamenhof

Armand Cotton atentigis pri eraro, kiun li faris en sia raporto pri la re-instalo de la ŝildo pri Zamenhof. La nomo de la pasejo ne estas Causambon, sed Isaac-Casaubon.

Kaj li aldonas interesan aldonan informon : En 1984, por plibonigi la muron ĉe la strato Vieux Collège 12, kie estis fiksita la ŝildo, la masonisto difektis ĝin kaj la urbo refaris novan ŝildon. La malnova de 1934 estis donita al s-ino Madeleine Stakian, la tiama prezidantino de La Stelo, kiu poste ĝin transdonis al Armand

Cotton. Li riparigis ĝin kaj fiksitis ĝin al la muro de sia domo en Vandoeuvres.

Pri la jaŭda renkontiĝo

Dum 12 jaroj François Perret regule organizis la jaŭdajn renkontiĝojn, unue kun Claude Piron kiel gvidanto kaj, post lia morto, mem trovante ideojn por plue renkontigi la kunvenemulojn. Bedaŭrinde pro manko de la necesa disponebla tempo François anoncis, ke li devos ĉesigi sian organizan aktivecon fine de la jaro, alvokante al plua kunvoko de la jaŭdaj kunvenoj, se iu pretos transpreni ilian organizon.

-oOo-

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

CP 246, 1000 Lausanne 22.

Tel. : 021 647 29 28

076 411 14 55

esperanto@citycable.ch

CCP : 10-26785-8

<<http://www.esperanto.ch/Lausanne>>

Kunvenoj : Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon en la monato je la 20.00.

Komitato : Prezidanto : David Bühlmann

Tel. : 021 624 36 38 ; Vicprezidanto :

Stéphanie Strappazzon 079 415 33 16 ;

Sekretario : François Randin 076 411 14

55 ; Kasisto : Sonia Daubercies 079 649 88

86.

Venontaj kunvenoj

Marte 1 : Venu kun viaj demandoj, lingvaj problemoj – ni provos respondi al vi. Venu kun viaj malkovraĵoj, lingvaj kuriozaĵoj por ilin prezenti ilin al ni.

Aprile 5 : Projekciado de kelkaj filmoj NANDIR, ekzemple la plej freŝdataj: *De Romo al Dubai kaj Tra la kanalo de Suez*.

Maje 3 : Programo decidota.

Junie 19 (sabate) : Ekskurso.

Septembre 6 : Programo decidota.

Oktobre 4 : Programo decidota.

Novembre 1 : Programo decidota.

Raporto

Por la Ĝenerala Asembleo okazinta la 1-an de februaro aperis en la februara *Informilo* de LES tre detalan protokolon de la pasintjara Asembleo de 2009.

-oOo-

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke.

Tel.: 041 280 46 12.

Kunvenejoj :

Restoracio Bären, Flecken 11, Rothenburg.

Restoracio Bellini (hotelo Continental-Park), Murbacherstr. 4. Tel.: 041 228 90 50

Ĉe gesinjoroj Anna & Koni Rey, Heimatweg 4, 6003 Luzern. Tel. : 041 210 25 88.

-oOo-

Neuchâtel

Pri la priesperanta mocio

Mireille Grosjean petis rendevuon en la kastelo de Neuchâtel, kie troviĝas la kantona registaro. Ŝi ricevis rendevuon por la 10-a de decembro matene. Ŝi iris kun Alain Bringolf, la iniciatinto de la mocio pri esperanto,

kiun la Parlamento de la kanton de Neuchâtel akceptis en februaro 2009. Ilin akceptis la vicĝenerala sekretario de la Departemento pri Edukado, kaj kune ili esploris ĉiujn eblojn, kiuj alportus neniun ŝanĝon en la leĝoj, neniun elspezon kaj kiuj estus en la kapablo de la kantona registaro. Informraporto estos verkita kaj la parlamentanoj ricevos ĝin post ĝia akcepto fare de la plenuma povo, la *Conseil d'Etat*.

-oOo-

La Tour-de-Peilz

Svisa Muzeo de la Ludoj

La Svisa Muzeo de la Ludoj situanta en La Tour-de-Peilz, kie Cesco Reale nun laboras, konsentis aldoni esperanton al la elekteblaj lingvoj por vizitoj kaj laborgrupoj. Tiuj lingvoj, al kiu do aldoniĝis esperanto, estas la franca, germana, angla, hispana, kaj portugala.

Cesco Reale pretas gvidi en esperanto grupojn por unu-hora vizito de la muzeo. Ankaŭ eblas partopreni en temaj laborgrupoj, kie oni lernas specifajn ludojn (afrikajn, ĉinajn, romiajn, faraonajn, ktp), kiuj daŭras 90 minutojn inkluzive de la muzea vizito.

La muzeo, en mezepoka kastelo, konservas ĉarmajn ekzemplerojn de ludoj antikvaj kaj modernaj el diversaj landoj (Barato, Afriko, Ĉinio, ktp).

Sekve al la muzea vizito eblas ankoraŭ restadi en la belega parko ĉirkaŭ la kastelo, aŭ partopreni alian programeron, kiel viziton al la

proksima Kastelo de Chillon aŭ al la Alimentarium de Nestlé en Vevey.

Kontaktabloj kun Cesco Reale:

Telefona: 041-76-2341843

rete: cescoreale@gmail.com

-oOo-

Wil

Esperanto-Klubo Wil (Orientvislando)

www.esperanto.ch/wil

Kunprezidantoj: Verena Chaves-Walder, Rosenhügelstr. 22, 9230 Flawil. Tel. : 071 393 41 49. chaves-walder@bluewin.ch kaj Wolfram Fischer Steigstrasse 12, 9116 Wolfertswil. Tel. : (P) 071.390.04.48 (O) 071.390.04.44. Fax : 071.390.04.47.

Kunvenoj : La esperantistoj kunvenas ĉiun unuan merkredon en la monato vespere de la 19-21 h. en la b'treff en Flawil situanta en la iama stacidomo.

Venontaj kunvenoj

Februare 3: Per biciklo al Aŭstralio kun Benno Frauchiger.

Marte 3: Ĝenerala jarkunveno. Ĉekomence rakonta rondo.

-oOo-

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

Archstrasse 2, 8610 Uster.

Poŝfako 858, 8034 Zürich.

Tel. 044 251 50 25 (dum oficejaj horoj)

Poŝtkonto: 80-17287-1

<http://esperanto.ch/zuriko>.

**La kunvenoj okazas en
Centro "Karl des Grosse,
Kirchgasse 14, 8001 Zürich.**

Renkontiĝoj regulaj

ĉiam la lastan ĵaŭdon de la monato en la hejmo de Michael Roesser, Weinbergstr. 137, 8006 Zuriko je la 20.30 (rekte apud la haltejo "Rössli-strasse" de la tramoj 7 kaj 15 je 10 minutoj de la ĉefa stacidomo).

**Informoj pri la aktuala programo
de Esperanto-Societo Zuriko
troviĝas en la reto sub:**

www.esperanto.ch/zuriko/programo.ht

zuriko@esperanto.ch


<http://esperanto.ch/zuriko>

Venontaj kunvenoj

Februare 25 ĵaŭde 20.30 : Ĝenerala kunveno ĉe Michael Roesser.

Marte 25 ĵaŭde 20.30 Libera kunveno ĉe Michael Roesser.

-oOo-



Kongresen

**Junulara Esperanto Semajno (JES) en Zakopane, Pollando
26.12.2009 – 03.01.2010**

Zakopane estas turisma kaj bela urbeto iom sude de Krakovo en montara regiono. Antaŭ kelkaj jaroj okazis tie la Internacia Junulara kongreso (IJK), kaj nun ili organizis vintran aranĝon. Ili ; tio estas Pola Esperanto-Junularo (PEJ), Germana Esperanto-Junularo (GEJ) kaj la klubo Varsovia Vento, sub la aŭspicio de TEJO.

Ĉirkaŭ 250 junuloj aĝaj inter 17 kaj 38 jaroj, eĉ kelkaj ĝis 50 jaroj, venis el preskaŭ ĉiuj landoj de Eŭropo. Laŭ mia scio ni estis 6 el Svislando.

Ni loĝis en lernejo, kies klasoĉambrojn oni malplenigis por transformi ilin al amasloĝejoj. Surplanke kun maldika matraco havanta po 50 centimetrojn da spaco larĝe por persono, tio povas ŝajni ne tiom komforta. Sed por junuloj tio tute konvenas, ĉefe ĉar oni ne venis ĉi-tien por dormi !

Ĉar onidire junaj esperantistoj kutimas vivi pli nokte ol tage, tial la manĝoj estis planitaj laŭ iom surpriza horaro : matenmanĝo inter 9h30 kaj 12h00, tagmanĝo inter 16h00 kaj 18h00, kaj vespermanĝo je la 23h30 !

Bona etoso regis. Ni ĝojis revidi esperantistajn geamikojn, ni babilis, kune ludis, kelkfoje lernis, kaj nokte dancadis aŭ aŭskultis koncerton. El Danio venis la fama esperanta kantisto Kimo. Li amike partoprenis la semajnon kaj unu- aŭ du-foje koncertis. Lia kanto *Sola* verkita antaŭ dudeko da jaroj fariĝis vere tradicia junulara esperanto-kanto. Iam li eĉ devis haltigi sian koncerton, ĉar la publiko tro entuziasme daŭre kantadis la revenaĵon.

Ĉiutage okazis ekskurso al muzeoj, naturo, banejo... Kelkaj skiemuloj esperis neĝon. Sed neĝon ni ne havis, krom sur la skiadejo, do tio ankaŭ fariĝis aktiveco, kvankam ne estas tre ekologie uzi neĝon artefaritan. Kaj fakte neĝomanko ebligis marŝadojn sur monto en bela arbaro. Por tiuj, kiuj estis maltrafintaj la ekskurson, kaj tamen ne volis resti la tutan tagon malekstere, Irek, ŝatata polo kaj ĉefa kunordiganto, gvidis ne-oficialan marŝan ekskurson, en kiu mi partoprenis unufoje. Ni iris ĝis supro de monto, 1400 metrojn alte. De tie oni vidas la tutan urbon kaj valon : belan pejzaĝon !

Reveninte sube ni trinkis varman vinon en tipe loka restoracio, kaj poste grupo iris per aŭtobuso al banejo. Pri tio mi rakontu anekdoton : Apud mi sidis en la buso iu franco, kiu verŝajne estis komencanto ; li ne ankoraŭ ĉion komprenis en

esperanto. Ekzemple li ne komprenis, ke la buso, en kiun li eniris, veturos al banejoj. Li kredis, ke temis pri ekskurso al muzeo. Do li ne kunprenis bankostumon kaj alveninte li devis enui du horojn dum la aliaj ĝuis varman akvon.

Nu, mi rakontu nun mian lastan tagon, la tago de la rehejmiĝa vojaĝo, ĉar tiun tagon mi restis veka dum 33 horoj! Mi havis flughileton de Krakovo al Bazelo tra Munkeno por la 3-a de januaro je la 13h00. Do unue mi pensis, ke mi povos simple trafi buson en Zakopane sufiĉe frue matene, eble je la 7-a horo. Sed la antaŭan tagon, reveninte el skiado finposttagmeze, mi renkontis Alex, junan polan organizanton, kiu asertis, ke nun vere indas rezervi busbileton. Zuzaj kaj li konsentis akompani min al la stacidomo por aĉeti la necesan bileton. Pro mia nescipovo de la pola lingvo mi feliĉis havi interpretistojn. Ili konsilis al mi trafi buson la morgaŭon jam je la 6-a horo, ĉar, pro intensa trafiko kaj ĵus falinta neĝo, buso verŝajne pli malrapidos.

Dum la nokto, post la koncertoj, oni asertis, ke la busoj verŝajne bezonos eble eĉ ok horojn por atingi la urbon Krakovo! En tiu kondiĉo mi certe maltrafus mian flugon, tion mi timis. Aliflanke, german-franca karavano estis ekironta per trajno je la 3-a horo post la noktomezo. Lastminute mi decidis akompani ilin ĝis Krakovo.

Ni do 30-ope piediris al la stacidomo. Post la 7-a horo, kiam elheliĝis, tiam ni alvenis vekaj en dormantan urbegon. Estis la dimanĉo matene. Dum aliaj daŭrigis la vojaĝon, ni 4-ope vizitetis la malnovan urbon kaj matenmanĝis en restoracio. Poste ni denove disiĝis kaj duope, Elli kaj mi, iris al la flughaveno. Ni fine disiĝis en Munkeno. Samvespere mi alvenis hejme, sed en la flughaveno de Bazelo mi ne retrovis mian valizon. Tio ne tre gravis; ĉar mi certis, ke ĝi alvenos per poŝto post kelkaj tagoj.

Pasporta Servo

Estante la nova landa organizanto de Pasporta Servo por Svislando mi iom klarigos pri tiu organizo, kiu ebligas gastigi senkoste ĉe esperantistoj ĉirkaŭ la mondo.

Ĝis 2008 la listo de la gastigantoj aperis po unu fojon jare en libreto. Nun la sistemo evoluas, iom ŝanĝiĝis. Pro tio okazis komplikaĵoj kaj oni ne povis eldoni la libron en 2009. Nun *Pasporta Servo* fariĝis ĉefe reta sistemo, sed tamen baldaŭ reaperos ankaŭ papera versio, kiun vi povos mendi ĉe la libro-servo de UEA.

Eble vi estis gastiganto dum la antaŭa sistemo, sed por resti gastiganto kaj reaperi en la listo vi nepre devas aliĝi per tiu retpaĝo:

<http://www.pasportaservo.org>

Kaj se vi tion ne estis antaŭe, fariĝu gastiganto nun!

En la “kampo” urbo, indiku konatan urbon proksime de via hejmo, sed ne skribu ĝian esperantan nomon. Se vi volas aperi en la libreto eldonota en 2011, vi nepre indiku «Mi gastigas». Se vi havas iun ajn demandon, skribu al

pasortaservo@tejo.org aŭ demandu al mi telefone (aŭ rete se vi ne atendas respondon tro rapidan).

Kaze ke vi ne povas aŭ ne volas uzi la reton kaj tamen deziras aperi kiel gastiganto en la eldono de 2011 (bedaŭrinde tro malfruas por tiu de 2010) vi simple sendu viajn informojn al mi, kaj mi transdonos ilin al Pasporta Servo. En tiu kazo bonvolu indiki :

- via(j)n nomo(j)n
- vian naskiĝjaron
- vian precizan adreson (kun lando)
- proksime de kiu granda urbo vi loĝas
- ĉu oni rajtas aŭ ne fumi en via hejmo
- kiom da gastoj vi pretas gastigi samtempe, kaj dum kiom da noktoj
- kiom da tagoj antaŭ alveno oni devas kontakti vin
- Ĉu la gasto devas alporti dormosakon ?
- Kiel oni povas vin kontakti (telefono(j) (laŭ internacia formo), retpoŝto...)
- Se ŝajnas al vi, ke indas aldoni iun ajn informon, klarigon bonvolu aldoni !

Eĉ se vi loĝas en unuĉambra loĝejeto eblas gastigi. En tiu kazo bonvolu indiki tion.

Jen kiel kontakti min : tel : 078 644 79 07:

Retadreso : luc.allemand@bluewin.ch

poŝtadreso : Luc Allemand, Seignette 8, 2616 Renan.

Kun dankoj kaj salutoj de Luko, kiu prezentas sian Valon *Les Convers*



La Valo *Les Convers* sub neĝa mantelo kvietas,
tion bela mi trovas.

En mia ĝardeno paŝaj spuroj, neĝamaso ĉe la tobogano.

Herbo aperas sub ŝirmema arbo.

Aliflanke dukolora abia arbaro kovras la monton :

blanke kaj malhelverde, eĉ bluece.

Ĝia supro malaperas en malvidebliga nebulo.

Silentas en la valetto.


Redaktas: Richard Schneller (rs), Höhenstrasse 1 b, CH-9300 Wittenbach, rischneller(ĉe)gmail.com. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Utila Estas Aliĝo

Tra la unua jarcento de UEA

Tio estas historie valora libro de la aŭtoro de *La danĝera lingvo*, Ulrich Lins. Speciale por la juna generacio ĝi « utilas », sed ankaŭ por personoj ne multon sciantaj pri la historio de UEA ĝi donas interesan superrigardon. Unuavide la titolo impresis min iom strange, sed mi komprenis vidante la lastan kovrilpaĝon, ke oni reprenis sloganon sur karto el la unua epoko, kiam la sidejo estis en Ĝenevo (12, boulevard du Théâtre). Ne temas pri plena analizo de la historio de UEA, sed pri tri eseoj kiuj instigu al pliaj laboroj : – 1 : « Tra la unua jarcento de UEA » estas konciza pritrakto, kiu tamen priskribas la ĉefajn okazaĵojn, atingojn kaj problemojn ĝis en la jaro 2007. – 2 : « La heredaĵo de Hector Hodler » temas pri la fondinto de UEA kaj ties ideoj pri praktika aplikado de la internacia lingvo en transnaciaj rilatoj interhomaj. Lian « desubisman » metodon ne aplikis liaj postsekvantoj, sed ĝi ŝajnas al ni nuntempuloj denove aktuala. – 3 : « Ivo Lapenna kaj la komunistoj » estas provo de sobra

rigardo al persono, kiu vekis pasiojn en alta grado, kaj al la tiama politika kaj ideologia situacio en komplika mondo, tra kiu Lapenna klopodis stiri la asocion. Fine listo de prezidantoj, direktoroj de UEA kaj redaktoroj de *Esperanto*, konciza kroniko de la movado kaj bibliografio kompletigas la « utilan » libron. La grafika aranĝo de la libreto grandformata estas plaĉa kun multaj nigraj-blankaj ilustraĵoj sur bona papero. (rs)



Nove aperis

Verkoj de Rudolf Steiner en la lastaj du jaroj tradukitaj kaj eldonitaj de Willy Nüesch :

- La mondrigardo de Goeto, 2009, 149 p.
- Ĉeftraĵoj de ekkonoteorio de la goeta mondrigardo kun aparta konsidero de Ŝilero, 2009, 108 p.
- Vero kaj scienco. Antaŭludo de filozofio de libereco, 2009, 62 p.
- La kristianismo kiel mistika fakto kaj la misteroj de la anti-kveco, 2008, 127 p.

- La mistiko en la komenco de la novtempa spiritovivo kaj ĝia rilato al la moderna mondrigardo, 2009, 107 p.
 - La vekigo de la animoj. Animaj kaj spiritalaj okazoj en scenaj bildoj, 2008, 127 p.
 - El la akaŝo-kroniko, 2009, 169 p.
- El la germana klasika literaturo:
- J. W. Goethe, Torkvato Tasso, dramo, 2008, 113 p.

Mendoj eblas ĉe Willy Nüesch, Brückfeldsr. 11, 3012 Bern.


Koncerto kun Luiza

Dank' al Martine Schneller, Steve Muriset (komponisto) renkontiĝis kun Luiza Carol (verkistino) kaj el tiu renkontiĝo naskiĝis la verko « Le Jour étoilé » (La stelita tago), oratorio prezentota en la Baziliko (« Ruĝa preĝejo ») de Neuchâtel la 11-an, 12-an kaj 13-an de februaro 2010 je la 20a horo 15.

Ĉiuj esperantistoj estos bonvenaj ! Por rezervi lokon: philippelena@bluewin.ch

Kiel atentigis nin Luiza dum la unua pres-konferenco (la 1-an de oktobro en la Baziliko), tiu verko estas antaŭ ĉio mesaĝo de espero kaj la ideo mem estas tiu de esperanto. (Ŝi mem venos el Israelo por ĉeesti la tri koncertojn.)

(Informoj : www.lejouretoile.ch)



ÉGLISE ROUGE, NEUCHÂTEL

ASSOCIATION VALENTINIANE DE CONSUMPTORS

11, 12, 13 FÉVRIER 2010 À 20H15

PLAQUE EN ALUMINIUM MOBILISER, COUVERTURE DES PORTES EN ALU
www.lejouretoile.ch

rne.ch MIGRUS La Montagne

Ruslando je la zamenhofa epoko

Sébastien MORET

Katedro de slavaj lingvoj – Universitato de Laŭzano

Sebastien.Moret@unil.ch


Okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de Lazaro Ludoviko Zamenhof s-ro Claude Gacond bonvolis inviti min por prelegi ĉe CDELI en La Chauv-de-Fonds pri Ruslando je la zamenhofa epoko. Mi konsentis plezure, ĉar ekde pluraj jaroj Claude Gacond helpadas min en la kadro de miaj serĉadoj pri Esperanto en Sovetio kaj Ruslando. En tiuj kondiĉoj tiun prelegon, kies tekston vi nun legas, mi konsideris kiel dankilon. Mi devas danki s-ron Gacond ne nur pro la invito prelegi, sed ankaŭ pro la fakto, ke li esperantigis la unuan parton de la prelego kaj lingve kontrolis la duan kaj la trian. La prelego nomiĝas « Ruslando je la zamenhofa epoko », sed ĝi ankaŭ temos pri Sovetio. La prelego havos tri partojn :

- la unua precize pri Ruslando en la zamenhofa epoko ;
- la dua pri la historio de Esperanto en la cara Rusujo ;
- kaj la lasta pri Esperanto en Sovetio.

Ruslando je la zamenhofa epoko

Lazaro Ludoviko Zamenhof ekvivas la 15-an de decembro 1859 en Bialystok en tiu ĉi domo.

Tiam Rusujo daŭre restadas en malorda periodo, en kiu ĝi stagnas ekde pluraj jaroj. Pri tiu malordo mi havos la okazon raporti. Se mi diras « Rusujo », estas fakte ĉar la naskiĝurbo de Zamenhof, Bialystok, kiu hodiaŭ situas nord-oriente de Pollando, tiam apartenis al la cara Rusujo.



La naskiĝa domo de L. L. Zamenhof en Bialystok.

Okaze de la tria dispartigo de Pollando en 1795 tiu urbo estis atribuita al Prusujo. Sed en 1807, post la subskribo de la traktato de Tilsit, kiu vidis Rusujon aliĝi al la kontinenta napoleona bloko kontraŭ Britujo, tiam granda parto el la orienta Pollando, kun Bialystok, fariĝis rusa posedaĵo.

Mi menciis la malordan periodon en Rusujo je la zamenhofa epoko. Por kompreni ĝian kaŭzon estas necese fari malantaŭan salton tra la tempo.

En 1855 mortis la caro Nikolao la 1-a, kiu regadis super la Rusa Imperio ekde 1825. Li estis senkompata aŭtokrato sen psikologio kaj kompren-limigita. Lia tali-amplekso estis tiom impresiga, kiom lia neregebla karaktero. Li emis ĉion regadi, ĉion kontroli. Estas li, kiu asertis, ke « *la homa vivo entute estas nenio*

alia ol servado, ĉar servado estas ĉies sorto».¹ Per tiu citaĵo oni pli malpli karakterizas lian personecon. Cetere Nikolao la 1-a estis konvinkita militemulo, mem oficiro, pasiulo je militaj kampanjoj kaj ekzercoj, granda fakulo pri fortik-ajaj problemoj. Li ŝategis disciplinon.



La caro Nikolao la 1-a

Oni povas aserti, ke pluraj trajtoj el lia karaktero iel rezultas el la momento de lia naskiĝo : 1796. Tiam Rusujo ĉesis ĝui pri la progresiga etoso propra al la eŭropa jarcento de la klereco, kiel tio antaŭe estis dum la epoko de la Granda Katerino, almenaŭ komence de ŝia regado (1762-1796). La rusujan etoson fine de la 18-a jarcento markis militoj kaj viglaj rezistemoj kontraŭ Napoleono. Rusujo proklamis sian fidon je aŭtokratio kaj ortodoksismo konsiderataj kiel du pilieroj, sur kiuj baziĝas la cara imperio. Cetere, kiam Nikolao la 1-a estis nomumita caro en 1825, tiel li difinis sian celon : protekti en la patrujo la establitan ordon, kaj aparte la aŭtokratecon.

Kiel mi jam ekmenciis, Nikolao la 1-a volis ĉion estri. Kaj tion li efektivigis absolute sen malhelpo dum sia tuta regado. Li volis ĉion scii : kion pensas la loĝantaro, kion skribas la verkistoj. Lia timo kontraŭ renversemo kaj ĉefe kontraŭ revolucio estis kvazaŭ paranoja. Tiu caro starigis iun paralelan administradon rekte submetitan al liaj ordonoj, kun politika polico (la fama « tria sekcio »), kun komitatoj nepre taŭgaj por solvi precizan problemon, kaj kun « apartaj senditoj » ŝarĝitaj plenumigi liajn ordonojn ĉie en tuta Rusujo laŭ la plej konvenaj templimoj.

Firma protektemulo de aŭtokrateco kaj rifuzanto de ĉia ideo pri partopreno de la loĝantaro al la aferoj de la lando, Nikolao la 1-a povis esti kontraŭstaranto al ĉia reformo, eĉ kiam la ekonomia kaj socia situacio de la lando tion estus bezoninta : la servuteco (pri tio mi reparolos) kaŭzis provizadajn problemojn, la enlandaj industrioj kaj komerco estis neniel kompareblaj rilate efikon al tiuj de Eŭropo. Resume, dum Eŭropo vigle eniris en industrian kaj kapitalisman eraon, siaflanke Rusujo stagnadis kaj postrestadis. La caro kontentiĝis okazigi kelkajn jurajn reformojn neniel riskantaj taŭzi la establitan ordon.

Lia timemo kontraŭ ŝanĝoj plivigliĝis post la eŭropaj ribeloj de 1830 kaj 1848. La caro tiam malpermesis al siaj regatoj vojaĝi eksterlanden, kaj, la ideoj povantaj esti pli danĝeraj ol la armiloj, li efektivigis politikon esprim-limigan kaj malliberalan rilate al la universitatoj kaj al la kleruloj. Oni eĉ aludas, ke Nikolao la 1-a havis la ideon antaŭplani tutsimplan fermon de ĉiuj universitatoj.

¹ N. Riasanovsky, *Histoire de la Russie*, p. 352.

La historiisto Pogodin, kvankam oficiala registara historiisto, tiam skribis, ke Rusujo vivas en « *tombeja kvieto odoranta je putro same fizika kiel morala* ».²

Iel direblas, ke la eksterlanda politiko de Nikolao la 1-a respegulis la ideojn, kiuj formis la bazon de lia interna politiko. Defendanto de la reganta ordo kaj de la dinastia leĝeco, li ne akceptis vidi Eŭropon en movado kaj transformiĝo. El tio fontas la moknomo, kiun li ricevis : Nikolao la 1-a estis konsiderata kiel la « *Ĝendarmo de Eŭropo* ». Dum la daŭro de sia regado li atentegis, ke la malnova ordo persistu kaj ke nenio ŝanĝiĝu.

Nikolao la 1-a tamen dufoje ekmilitis, interalie kontraŭ Turkujo en 1828, por defendi samreligiajn grekojn ortodoksajn kaj por apogi ilian ribelon kontraŭ la otomana regado. La venko de la rusoj kontraŭ la turkoj ebligis al Rusujo konkeri novajn teritoriojn, sed Nikolao la 1-a tamen atentegis, por lasi la eblon al la Otomana Imperio restadi en Eŭropo firma piliero de ĝia stabileco. Nikolao la 1-a ekzemple helpis la Subliman Pardon al subpremo de la egipta ribelo de 1832.

La finon de la regado de Nikolao la 1-a karakterizis la Krimea Milito, kies konkludon li ne travivis. Ĝi fontis el konflikto sur la Sankta Tero inter katolikoj kaj ortodoksuloj, pri la administrado de kristanaj sanktaj lokoj. Dum Napoleono la 3-a apenaŭ helpis al la katolikoj, kontraŭe Nikolao la 1-a sendis ultimaton al Turkujo (la Sankta Tero tiam estis posedaĵo de la Otomana Imperio), ordonante tuj solvi la problemon favore al la ortodoksuloj. Konstantinopolo rifuzis tiun trudon en siajn internajn aferojn kaj elpelis la caran senditon. Post diplomatia procezo, kiun sekvis aliaj komplikajoj, Rusujo kaj Turkujo ekmilitis en oktobro 1853. Turkujon baldaŭ apogis Francio, Britujo kaj Piemonto-Sardujo. Indas menci, ke la religia problemo estis nura preteksto por la caro ; lia reala celo estis tute alia : profiti pri la tiama malforto de la Otomana Imperio (mi rememorigu, ke tiam oni parolis pri la Otomana Imperio kiel pri la « *malsanulo de Eŭropo* ») por kontroli la Bosforan kaj Dardanelan Markolojn kaj por tiel akiri kontrolon super la komerco inter la Maroj Nigra kaj Mediteranea.

La bataloj disvolviĝis ĉefe ĉirkaŭ la Krimea Duoninsulo, tiam limo inter ambaŭ imperioj. La rusoj rapide troviĝis en malvenka situacio, kaj la turkoj sieĝis la urbon Sebastopolo dum preskaŭ tuta jaro. Fine la urbo kapitulacis la 11-an de septembro 1855, post teruraj perfortoj kaj ekscesoj. Ĉar Nikolao la 1-a estis jam mortinta en marto, tial estas lia filo Aleksandro la 2-a, kiu devis zorgi pri la pac-diskutoj.

Dum historie oni rememoras pri Nikolao la 1-a kiel pri aŭtokrata tirano, Aleksandro la 2-a (1855-1881) ricevos la titolon de « caro liberiga ». Tamen, dum la regado de sia patro, Aleksandro neniam manifestis sian kontraŭstaron aŭ alidirektajn ideojn. Kiam li nomumiĝis imperiestro de ĉiuj Rusujoj, tiam li fariĝis iom pli liberala, sed pli pro neceso, ol pro reala konvinko. Ankaŭ Aleksandro kondutis kiel konservativulo.

² N. Riasanovsky, *Histoire de la Russie*, pp. 358-359.



La caro Aleksandro la 2-a

Komence de sia regado Aleksandro la 2-a abolis iujn el la trudaj kaj kritikindaj decidoj de lia patro, kiel la malpermeson vojaĝi eksterlanden. Sed antaŭ ĉio li famiĝos pro la abolo de la servuteco en Rusujo. En tiu lando la servuto estis ege ampleksa fenomeno daŭranta de pluraj jarcentoj. En 1811 la servutularo atingis 58 procentojn de la loĝantaro, kaj komence de la regado de Aleksandro la 2-a ankoraŭ 45 procentojn³. Sed ne pro humanismo la caro decidis nuligi la servutecon. Ni jam menciis, ke la servuteco malfavoris konvenan provizadon de la lando.

Krome, ekde pluraj jardekoj, kamparanaj ribeloj multiĝis kaj oftigis minacante la stabilecon en la lando. Cetere, tiurilate, Aleksandro la 2-a asertis, okaze de sia kroniĝo, ke preferindas abolo de servuteco fare de supera povo, ol atendi, ke tiu iniciato venu el la popola bazo. Krome la publika opinio komencis malfavore rigardi tiun postvivon el la pasinteco.

La decido aboli la servutecon ne realiĝis rapide. Okazis pluraj diskutjaroj. La ideo formiĝis en 1856, sed la oficialan dekretan subskribis la caro nur la 3-an de marto (19-an de februaro en la malnova kalendaro) 1861. Tiel, kiam Zamenhof naskiĝis, tiam Rusujo troviĝis plene en tiuj diskutadoj pri la abolo de servuteco. Malgraŭ tiu granda ŝanĝo, indas diri, ke la vivo de la servutoj ne multe ŝanĝiĝis; ĝi restadis ĝenerale tre mizera, tre malagrabla kaj tre malfacila. Aleksandro la 2-a ankaŭ entreprenis aliajn signifajn reformojn. Li simpligis la administran sistemon, kiu ankoraŭ datumis el la epoko de Katerino la 2-a, kaj li ĉefe kreis justicon indan je tiu nomo.

Antaŭe la juĝa sistemo estis neniel sendependa el la rega povo kaj ekzistis tiom da proceduroj kaj sentencoj, kiom da juĝistoj. Aleksandro la 2-a ankaŭ starigis devigan soldat-deĵoron por ĉiuj (antaŭe nur la malsuperaj klasoj konis tiun devontigon), kies serv-daŭro evoluis de 25 jaroj komence de la regado de Aleksandro la 2-a al 6 jaroj en 1874.

Oni vidas, ke Rusujo, dum la junaĝo de Zamenhof, estis en plena agitado kaj ke multis grandampleksaj ŝanĝiĝoj. Sed ĉio tio ne faris el Rusujo paceman landon, simile al la bildo de iuj eŭropaj ŝtatoj. Rusujo restis kruda ŝtato, sovaĝa kaj perfortema, viktimo de troigoj kaj agresemo. Mi rememorigu tiurilate la faman leteron, kiun Zamenhof skribis al sia rusa amiko Nikolao Borovko (1863-



Proklamo de la ukazo pri la abolo de la servuteco

³ N. Riasanovsky, *Histoire de la Russie*, p. 400.

1913), en kiu li priskribas la urbon de sia infaneco, el kies problema situacio fontis lia volo krei lingvon internacian :

Mi naskiĝis en Bjelostoko, gubernio de Grodno. Tiu ĉi loko de mia naskiĝo kaj de miaj infanaj jaroj donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj. En Bjelostoko la loĝantaro konsistas el kvar diversaj elementoj : rusoj, poloj, germanoj kaj hebreej ; ĉiu el tiuj ĉi elementoj parolas apartan lingvon kaj neamike rilatas la aliajn elementojn. En tia urbo pli ol ie la impresema naturo sentas la multepezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikaj partoj.

La situacio de Rusujo malstabilis pro pluraj kaŭzoj. La unuan kaŭzis la konsisto mem de la lando. Rusujo estis ja giganta lando, la loĝantaro estis nombrega, kaj okupiĝi pri ĉies bonfarto ne estis inter la priokupoj de la registaro, kiu agadis laŭ tute hierarkia koncepto de la societo. Sed eĉ se la registaro tion estus volinta, ĝi ne estus povinta kontentigi ĉiujn.

Aldone la reformoj kaŭzis malkontentecojn kaj frustriĝojn. Malkontentecojn ĉe la nobelaro, kiu vidis la propran situacion ŝanĝiĝi, kaj frustriojn kaj malkontentiĝojn, ĉar iuj celis pli drastajn reformojn. Tial la jaroj 1860-1870 fariĝis malfacilaj en Rusujo : kamparanaj ribeloj, nobelaj provoj por rekonkeri siajn privilegiojn, kaj ĉefe perfortaj agoj de revoluciaj grupoj.



Bakunin

La revoluciaj agadoj en la tiama Rusujo povas esti klasigitaj laŭ du standardoj, kiuj plej ofte fine kuniĝis. Ekzistis unue tiuj, kiujn oni nomis nihilistoj ; plejparte ili estis partizanoj de la anarkiisto kaj fondinto de la liberema socialismo Bakunin (1814-1876).

Tiuj adeptoj estis firmaj kontraŭuloj de la establita ordo kaj de la ortodoksisma premo sur la rusan societon. Ili rifuzis ekspluatadon kaj subpremon. La plej konata el tiuj nihilistoj estas Ĉerņiŝevski (1828-1889). Apud la nihilistoj agadis la populistoj aŭ *narodniki* ruslingve. Inter ili troviĝis dum tempo Dostojevski. La populistoj aspiris riĉigi la societon helpe de sia privilegia kaj enviinda situacio okupiĝante pri la popola gentaro kaj la kamparanoj, kun la celo konduki ilin al feliĉo. Do iuj kleruloj iĝis kamparanaj instruistoj. Sed aliaj songiŝis al pli drastaj ŝanĝoj. Al socia ordo pli justa, kaj eĉ al socialista revolucio. Sed la popolo ne kunagis, ĝi eĉ denunciis iujn el tiuj agitantoj.



Nikolao Ĉerņiŝevski




Sergej Nečajev

Ĉar la popolo ne kunagis, la konvinkitaj revoluciemuloj emis mem ekagi, kaj eĉ perforte. Tiaj estis la ideoj de la famiĝinta Sergej Nečajev (1847-1882). Nečajev ilin prezentis en sia fama libro *La katekismo de la revoluciemulo* (1868), en kiu li rekomendas la neniigon de la ŝtato kaj la fizikan eliminon de ĉiuj opoziciuloj al reformoj. En tiu medio formiĝis perfortemegaj societoj sekretaj tie kaj tie ĉi en Rusujo, sed ĉefe en la grandaj urboj, kaj ofte okazis atencoj.

Tiuj revoluciaj grupoj rekomendis politikon kun planitaj atencoj celantaj senkapigi la ŝtatan strukturon, sed ili ankaŭ eksplodigis oficialajn domojn. La ŝtata respondo estis same sanga kaj perfortema, kaj multnombraj revoluciuoj estis ekzekutitaj. Ekde la komenco de tiuj revoluciaj ĝenoj, ĉirkaŭ la fino de la jaroj 1860, la caro, kiu malbone komprenis la kontraŭ-agadojn al la gravaj reformoj, kiujn li entreprenis, vigle ĉesigis siajn reformojn kaj firme agadis por la protekto de la establita ordo, eĉ se ĝi estis jam multe ekevoluinta.

Sed la celo plej alta kontraŭ la povo fine estos tamen atingita. Sekve al travivo de kvin murd-atencoj kontraŭ lia persono inter 1866 kaj 1880, Aleksandro la 2-a fine falis sub la bomboj de la grupo la « *Popola Volo* » la 13-an de marto 1881 en Sankt-Peterburgo.



Morto de Aleksandro la 2-a

Post lia morto oni malkovros sur lia skribotablo skizojn de projekto de konstitucio, kiun li estus dezirinta doni al Rusujo. Dank' al tiu malkovro, sed ankaŭ al la plej gravaj ŝanĝiĝoj, kiujn konis la lando sub lia instigo, Aleksandro la 2-a restos suvereno ŝatata kaj respektata, eĉ se lia regado ne estis tiu de liberala kaj liberiga monarko.

Kiel pruvo de la amo de la rusa popolo por tiu liberiga caro ekzistas la fama katedralo de Sankt-Peterburgo, la Katedralo de la Sankta-Savanto-super-la-verŝita-Sango. Ruslingve :

Xram Spasa na Krovi.

Estas ja honore al la caro Aleksandro la 2-a kaj ĉe la loko mem, kie li mortis, ke estis starigita ekde 1883 tiu katedralo, kiu estas unu el la plej belaj kaj plej famaj de Sankt-Peterburgo. Tiu katedralo inaŭguriĝis nur en 1907.

Videble la juneco de Zamenhof evoluis en disvolviĝanta Rusujo, unue eŭforia, kaj poste viktimo de la registara reago kontraŭ tiuj, kiuj volis pli da



La sankt-peterburga katedralo de la Sankta-Savanto-super-la-verŝita-Sango

ŝanĝoj. La registara reago ne ĉesis je la morto de Aleksandro. Kontraŭe, liaj posteuloj, per pli da viglo, streĉos al ordo-reveno kaj al respektemo de la du caraj agvortoj : aŭtokratio kaj ortodoksismo. Je la morto de Aleksandro la 2-a estas lia dua filo, kiu sidigis sur la tronon de ĉiuj Rusujoj sub la nomo Aleksandro la 3-a.



Aleksandro la 3-a

Aldoniĝis al tio strikta kontrolo de la gazetaro kaj cenzuro ekstreme truda kaj efika. Je la morto de Aleksandro la 3-a en 1894 estas lia filo Nikolao la 2-a, kiu ricevis la povon. Li estos, kiel vi scias, la lasta caro de la Rusa Imperio.

Sub lia regado reakcio plu daŭris: religiaj persekutoj, rusiga politiko, limigo de la individuaj kaj gazetaraj liberecoj. Oni povas iel diri, ke ambaŭ lastaj rusaj suverenoj ne vivis sur la sama planedo, ol iliaj regatoj. Blindigitaj pro sia volo garantii la estontecon de aŭtokratio, ili ne perceptis la katastrofan viv-situacion de la rusoj. Ilian vidon de la realo falsigis la silentema kaj senmova mondo, en kiu ili vivis. Tio, tutcerte aldonita al la karaktero etmensa kaj malvigla de Nikolao la 2-a, favoris la revoluciajn eventojn unue de 1905, kaj poste de 1917, kiuj kondukis al la malperado de la Rusa Imperio kaj al ĝia anstataŭigo per la proletara diktaturo.



Nikolao la 2-a

Post tiu iom detala priskribo de la historia situacio de Rusujo je la zamenhofa epoko, mi proponas iom detale interesiĝi al Esperanto kaj al ties historio en la rusuja etoso ĵus priskribita. Ni vidos, ke certamaniere la rusuja kaj sovietia historio speguliĝas en la Esperanta historio.

Esperanto en la cara Ruslando

Kiel ni scias, Zamenhof aperigis sian unuan libron pri lingvo internacia en 1887. Baze, Esperanto estis ne la nomo de la lingvo, sed la pseŭdonimo de la aŭtoro, sekve de Zamenhof mem. En tiu jaro, kiel ni vidis, en Rusujo regis la caro Aleksandro la 3-a, kiu, por venĝi la morton de sia patro, reagis tre forte kaj promulgis diversajn reglamentojn durajn, kaj inter ili cenzurajn. Tio klarigas la fakton, ke la unua libro de Zamenhof ne povis aperi en Rusujo mem. Ĝi eldoniĝis en Varsovio, tio estas en Pollando, rusa administra regiono, kie la cenzuro estis malpli vigla kaj strikta ol en Rusujo mem. Tiu libro estis tamen en la rusa lingvo.



La Unua Libro

En tiu reaga epoko en Rusujo, ĉiuj novaĵoj estis malfide konsiderataj, kaj Esperanto devis disvastiĝi neoficiale. Tiel, la unuaj esperantistaj societoj fondiĝis sekrete kaj kaŝe, kiel en Moskvo en 1889. Tamen, la unua oficiala societo aperis en Sankt-Peterburgo en 1892, sed la pliboniĝo ne daŭros longe. En februaro 1895 la gazeto *La Esperantisto* publikigis artikolon de Lev Tolstoj (1828-1910) « *Prudento kaj kredo* ». Tolstoj ne estis sole beletra verkisto, li ankaŭ propagandis anarkiismon kaj senaŭtoritatan kristanismon ; sekve lia rilato kun la cara registaro ne estis bona. Pro tiu artikolo la ruslanda cenzuro malpermesis la enportadon de la gazeto en Ruslandon, kaj oni devas diri, ke la evoluo de Esperanto en Ruslando estis bremsita dum deko da jaroj.

Post la unuaj gravaj revoluciaj okazintaĵoj en 1905, la cara registaro, nome la caro Nikolao la 2-a, devis iomete demokratiĝi. Li donis al Rusujo novan Parlamenton ; tio estis tre grava ŝanĝo por la lando. Samokaze li iomete mal-

⁴ H. Gorecka kaj A. Korĵenkov, *Esperanto en Ruslando*, p. 4.

pezigis sian premeĝon. Esperanto povis evolui : en aprilo 1905 aperis la unua numero de la gazeto *Ruslanda Esperantisto*, en 1906 la moskva societo estis oficialigita ; en 1908 fondiĝis la Ruslanda-Esperantista Ligo ; en 1909 aperis la gazeto *La Ondo de Esperanto* ; en aprilo 1910 okazis la unua Ruslanda Esperantista Kongreso (en ĝi Zamenhof faris sian faman paroladon pri la neceso paroli en Esperanto en ĉiuj esperantistaj kongresoj, ankaŭ en la naciaj kongresoj). Nur la 1911-a jaro estis « *malfacila por la movado* », ĉar unu el la rusaj gvidantoj, A. Postnikov (1880-1925), « *estis arestita kaj kondamnita pro spionado favore al Aŭstrio* ». ⁵ Sed ĝenerale oni povas diri, ke, en Rusujo, la epoko ĝis la milito estis favora por Esperanto. Tiun periodon karakterizis demokratiigo de la socia vivo kaj rapida ekonomia progreso ; sekve, Esperanto aperis kiel utila lingvo. En pluraj komercaj ekspozicioj kaj en fakaj kongresoj estis aranĝitaj sekcioj de Esperanto, sed ne nur en la du ĉefurboj, Moskvo kaj Sankt-Peterburgo. Same viglis la eldona agado en Ruslando : 37 esperantaj libroj aperis en 1912, kaj 39 en 1913. Plue, oni povis lerni la lingvon helpe de multaj kaj diversaj vortaroj kaj lernolibroj.

Sed, malgraŭ tiu bela panoramo, mi devas konfesi, ke la diversaj ruslandaj esperantistaj societoj kaj gazetoj ne estis bone unuiĝintaj ; estis problemoj kaj konfliktoj inter ili. Plue, la cara registaro neniam konsideris Esperanton amike. La esperantistoj « *estis konsiderataj kiel homoj nefidindaj* » kaj pri ili « *atentis la politika polico* » ⁶. Kaj kiel rakontis la fama gvidanto de la soveta esperantistaro, Ernest Drezen (1892-1937), « *ankoraŭ unu monaton antaŭ la februara revolucio de 1917 la petrograda [peterburga] guberniestro trovis necesa malpermesi preson de esperanto-gazeto* » ⁷.

Esperanto en Sovetio

Kompreneble, la komenco de la Unua Mondmilito, kaj la starigo, en Ruslando, de la nova soveta registaro kaj la ekapero de la interna milito, negative efikis al la aktivado de la ruslandaj esperantistoj. Estas klare, ke en tiu ĉi tempo Esperanto ne havis « *konkretan apliko-sferon* » ⁸ : « *antaŭ la lando staris vivgravaj problemoj [...] kaj la esperanto problemaro estis tiam neaktuala* » ⁹ ; plue « *Esperanto ne povis tiam havi praktikan aplikadon, ĉar la limoj de Soveta Respubliko estis fermitaj, kaj en ĉiuj frontoj oni devis batali ne per esperanta parolo, sed per armiloj* » ¹⁰. Sed tamen, malgraŭ tio, oni devas diri, ke kun la stariĝo de la komunista reĝimo tre multe diskutiĝis en Sovetunio la temo de la komuna lingvo, kaj sekve de Esperanto. Tion klarigas intern-struktura kaj

⁵ E. Drezen, *Historiaj studoj*, p. 153.

⁶ E. Drezen, *Historiaj studoj*, p. 106.

⁷ E. Drezen, *Historiaj studoj*, p. 106.

⁸ E. Drezen, *Historiaj studoj*, p. 157.

⁹ E. Drezen, *Historiaj studoj*, p. 155.

¹⁰ E. Drezen, *Historiaj studoj*, p. 156.

ideologia kaŭzoj. Sovetlando heredis de la rusa imperio ĝian multnaciecon, kaj iĝis same multlingva imperio. En ĝi estis parolataj pli ol 100 lingvoj. Sekve la interkomunikiĝo estis malfacila. Sed ĝi aperis tre necesa. Efektive la soveta registaro devis krei sian novan landon kaj novan unuiĝon. Por tion fari, por alkolektigi la loĝantojn de la juna imperio sub la soveta standardo, la bolŝevikoj bezonis povi paroli al siaj samlandanoj kaj kompreni ilin. La ideologia kaŭzo, pro kiu la komunlingva temo multe diskutiĝis en Sovetunio, aperas en la fama frazo, kiu konkludas la *Komunistan Manifeston* de Marx kaj Engel : « *Proletoj de la mondo, unuigu vin !* » Tiu slogano alvokas la mondajn laborulojn al unuiĝo kaj tiel estas la bazo de la monda revolucio : se la laboruloj agos izole kaj individue, ili ne plenumos sian taskon, la mondan revolucion. Lenino tion diris siamaniere en 1919 : la « *kompleta venko de la socialisma revolucio estas neebla* » sen « *aktiva kunhelpo* »¹¹. Solaj la kolektiva laboro kaj la unio de la fortoj plenumos la venkon de la proleta diktaturo.

Vere estis en la komenco de la soveta registaro tre multaj diversaj agadoj por Esperanto, sed tiuj agadoj ne estis oficialaj. Mi ne pensas, ke la unua soveta registaro planis enkonduki Esperanton aŭ alian internacian lingvon en la landon. Tiu registaro havis tre multajn aliajn kaj tre necesajn laborojn kaj taskojn. Estis interna milito, estis ekstera milito kun aliaj eŭropaj landoj, estis malsato, estis ekonomia ruiniĝo. Sekve la registaro ne havis tempon por pensi pri Esperanto : « *La kruda realaĵo instigis la popolajn tavolojn kaj la registaron zorgi pli pri milito, pri pano kaj karbo ol pri Esperanto* »¹². Pri tiu tre dura situacio precize raportis la soveta esperantisto Aleksandro Saĥarov (1865-1942) en sia libro *Rememoroj de centprocenta esperantisto* :

*La Sovetia Ruslando estis atakata kaj blokita de ĉiuj flankoj. La armeoj de blankgardianoj, helpataj de intervenaj eksterlandaj taĉmentoj, pli kaj pli alproksimiĝis al Moskvo. De ili estis okupitaj la plej grenriĉaj regionoj – Ukrainio kaj Siberio. La papermono tute senvaloriĝis. [...] Ĉio plej necesa por nutrado kaj vestado estis donata al loĝantoj senpage, sed ĉiu loĝanto devis devige labori laŭ postulo de registaraj organoj. La mono servis nur por kalkuloj inter privataj personoj aŭ por aĉeto de ne necesaj objektoj. Ĉio kion ricevis la vilaĝanoj de siaj kampoj, krom necesaj normoj por propra nutrado, ili devis redoni al la ŝtato, same la fabrikoj kaj uzinoj. Sed, ĉar la provizoj de la ŝtato ne estis sufiĉaj por kontentigi ĉiujn, la loĝantoj ricevis tre mizerajn raciojn ; ĉirkaŭ 100 gramojn da pano tage kaj iom da ceteraj bezonaj nutraĵoj. Niaj stomakoj ĉiam estis malplenaj kaj tio influis nian laboron. Krom tio ni ĉiam devis fari multajn piedvojaĝojn, ĉar nek la tramoj, nek aŭtomobiloj funkciis pro manko de hejtaĵo kaj malmultaj veturigistoj postulis tian pagon, kiu estis tute ekster niaj povoj.*¹³

